

1987 estas ankaŭ la centjara jubileo de Hector Hodler
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Enirante la jaron 1987-an estas bone tuj rememori, ke ĝi ne nur estas centjara jubilea jaro por esperanto, sed ankaŭ por treege grava esperantisto. En 1887 fakte naskiĝis Hector HODLER, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio. Tial ni opinias bone komenci la jaron 1987 konigante al vi la mallongan, sed efikan vivon de Hector HODLER kaj la penson de tiu ĝenevano, kiu certe kontribuis al la konstruo de Ligo de Nacioj pere de siaj artikoloj en la franca lingvo en "La Voix de l'Humanité" (La voĉo de l' Homaro), kie li ofte subskribis siajn artikolojn per la pseŭdonomo Homo. Ero el tiuj artikoloj aperis esperantilingve en la revuo Esperanto.

A.- Sed unue ni resume prezentu la mallongan vivon de Hector HODLER, citante el la artikolo de Edmond PRIVAT, aperinta en la revuo Esperanto en aprilo 1920, por honori la mortinton tridektri jaran. Ni citas:

Cl.- "Filo de l' granda pentristo Ferdinand HODLER, nia amiko naskiĝis en Ĝenevo en 1887, kiam lia patro ankoraŭ ne estis tutmonda famulo, sed pene baraktanta artisto, akre kritikata pro la forta originaleco de lia verko kaj malfacile batalanta por la ĉiutaga pano.

A.- Edmond PRIVAT daŭrigas raportante pri siaj kontaktoj kun Hector HODLER. Ni citas: "Kiam mi dekdujare eniris gimnazion, mi tuj rimarkis tiun novan kamaradon, altan, malgrasan, malriĉan, kun mirindaj okuloj kaj senordaj brunaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton. Lia neforgesebla figuro aperis sur pli ol unu pentraĵo de l' patro. Kiam ni kune elkuris el klaso je la kvara posttagmeze, Hector HODLER malgaje rapidis al la patra pentrejo sub tegmento por sidadi aŭ staradi terure senmove dum horoj kiel modelo. Dum tiu turmento li kutimiĝis je pensado. Tiam li lernis tiun silentemon kaj trankvilecon kiuj kaŝis sub iom nevarma eksteraĵo la plej senteman koron kaj fervoran animon.

Cl.- Kiam la patro ne bezonis lin, daŭrigas Edmond PRIVAT, ni faris kune longajn promenadojn, diskutante kiel knabetoj pri la profundaj misteroj de l' socia vivo. Li estis la pli saĝa kaj la pli multescia. Dekdujare li jam legis tutan Zola! Unu tagon en 1903 mi alportis en klason Esperantan gramatikon. "Ankaŭ mi jam eklernis la lingvon", li respondis kun brilo en okuloj.

A.- Kaj jen kiel komenciĝis ilia poresperanta aktiveco, ĉiam laŭ Edmond PRIVAT: "Post tri semajnoj ni jam flue interparolis en la nova lingvo kaj decidis fondi klubon kaj ĵurnaleton; "Juna Esperantisto". Unu post unu vendiĝis niaj belaj premilibroj aŭ volumoj de Jules VERNE por pagi la eldonelspezojn. La redakcio sidis dum kvin jaroj sur la sama benko en la fundo de klaso. Dum kiom da lecionoj pri matematiko ni gluis poŝtmarkojn, skribadis adresojn aŭ legadis patrajn leterojn de Profesoro CART aŭ d-ro ZAMENHOF!" (Fino de la citaĵo).

Cl.- Ilia intereso al esperanto ne estis sektema. Ĝi kondukis ilin al interlingvistikaj esploroj, sur kiuj baziĝos la certeco pri la supereco de esperanto super ties konkurantoj, kiuj tiam estis Volapük, Idiom Neutral kaj Bolak aŭ la Blua Lingvo. Ni citas Edmondon PRIVAT:

"HODLER jam montris ŝaton je ordo kaj serioza organizo. Ankaŭ li vidigis senpartian ekvilibron. Laŭ lia instigo ni lernis kune "Idiom Neutral" kaj "Bolak" por certigi, ke Esperanto estas ja vere la plej taŭga lingvo internacia. La organizo de la Dua Kongreso alportis novajn spertojn. HODLER speciale interesiĝis je la proponoj de s-roj ROUSSEAU kaj CARLES pri Esperantistaj konsuloj. Li insistis pri tio, ke nia movado devas stariĝi sur fundamento samtempe pli idealista kaj pli praktika, organizante reciprokan sinhelpadon inter bonvolaj homoj. Igi la lingvon tuj utila kaj prepari internacian tuthomaran popolon, jen la temo kiun pristudis lia pensema inteligento. En 1906 la gazeton "Esperanto" li reprenis el manoj de Paul BERTHELOT kaj redaktis ĝin laŭ tiu tendenco."

A.- Ĝis nun ni ne povis aliri tiujn ĉi unuajn numerojn de la gazeto "Esperanto", tial estas al ni malfacile raporti pri la penso mem de HODLER en tiu maturiĝa periodo. Nur ekde la periodo 1909 ni posedas liajn artikolojn, el kiuj ni abunde citos en la venontaj elsendoj. Hodiaŭ ni daŭrigu la citadon el PRIVAT: "Pasis knabeco. Forlasinte gimnazion, HODLER sindonis tute al nia movado. La patro jam ekfamigis tra la mondo kaj ebligis sian filon vivi pli libere. Tamen li volus, ke li fariĝu ankaŭ pentristo kaj lin instruis en la arto. Malgraŭ rimarkinda hereda talento, Hector HODLER rezistis tiun tenton al gloro. Li preferis labori por homara celo, sed li helpis sian patron en multaj okazoj kaj sekvis kun fervoro la progresojn de lia arto kaj la diskonigon de lia genia verkaro en la diversaj landoj. Li fariĝis por li valora kunlaboranto kaj amiko-konsilanto.

C1.- "De post 1907 ni havis la ĉagrenon ne plu vidi unu la alian ĉiutage, ĉar la maro nin ofte apartigis. En 1908, dum mi vojaĝadis tra Nordameriko por propagandi nian lingvon tie, HODLER daŭrigis sian sisteman agadon kaj fondis UEA-n kun Theophile ROUSSEAU. Ĉe nia Kvara Kongreso en Dresdono 1908 ni ĉeestis la unuan kunvenon de la nova asocio.

A.- Harold BOLINGBROKE MUDIE fariĝis prezidanto, kaj UEA antaŭeniris rapide. HODLER starigis internacian oficejon en ĝenevo... Lia kreaĵo, prave rimarkigas Edmond PRIVAT, komencis novan epokon en la movado.

C1.- Multaj esperantistoj memoras lian ĉeeston en diversaj kongresoj. Li ne estis parolema. Li estis modesta kaj senpretenda. Lia tono estis rekta kaj aŭtoritata. Li malŝatis ĉiun frazistecon kaj senutilajn vortojn. - Sub lia maniero iom abrupta regis profundaj bonkoro kaj delikateco.

A.- Ĉiumonate en lia ĵurnalo la esperantistaro legis liajn saĝajn, ĉiam kompetentajn konsilojn. Dum la milito li sciis konservi la estimon kaj amon de ĉiuj samideanoj, montrante la vojon kaj la devon al nova edukado de la homaro. Liaj artikoloj estis por multaj el ni bonfarantaj radioj de kuraĝiga lumo.

Cl.- Per tiuj citaĵoj el nekrologia artikolo de Edmond PRIVAT pri lia amiko Hector HODLER ni enkondukis serion da elsendoj, kiujn ni dediĉas al la fondinto de UEA, kiun la esperantistoj nepre rememoru dum la jubilea jaro de esperanto, kiu ankaŭ estas la centjara jubileo de Hector HODLER.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !